

Kursoj <-> Paroligaj rondoj

Aliaj travivaĵoj, aliaj lernsituacioj

Kurso (ĉeesta kurso) okazas per lerncela kunveno de instruisto kaj lernanto, lernantoj. La instruisto preparas la kurson per elekto de lerncelo, kiu konsistos el iu aspekto de la lernenda lingvo. Tiu gvidanto elektos la strategiojn, kiuj ebligas al la lernantoj malkovri tiun parton, akiri tiun aspekton ; povas esti plej diversaj taskoj kiel legado, ekzercoj, tradukoj, demandoj – respondoj k.s. povas esti parolaj aŭ skribaj aktivecoj. La instruisto korektas la produktaĵojn de la lernantoj, tion, kion ili diras, prononcas, skribas, respondas, tradukas... Pri la diversaj manieroj korekti pozitive kaj kuraĝigante venos alia artikolo.

Dum paroligaj rondoj la celo estas praktiko de la lingvo sen skribado, sen tradukado. Kompreneble akiro de scioj, kompreno de lingvaj fenomenoj povas okazi, sed tio ne estas la celo. La celo de tiaj kunvenoj estas trejnado de aŭskulta kompreno kaj de parola produktado, kaj de ambaŭ samtempe en adekvata interparolado. Tio estas necesa, ĉar tio ne fontas el racia pensado, sed el aŭtomataj refleksoj, kiuj devas funkcii rapide. Same kiel en kurso dum tiu kunveno estas gvidanto. Tiu persono preparos aktivecojn cele al paroligado de la studentoj. Povas esti improvizado, skeĉoj, demandoj-respondoj, rolludoj k.s. Spontaneco gravas. Do la instruisto ne instruos, ne prelegos. Estas defio por la lernanto : mastrumi samtempe la enhavon de la diraĵoj kaj la gramatikon... post aŭskultado de demando tuj formuli adekvatan respondon... Pro tio dum la parola aktiveco la gvidanto ne devas interveni iel ajn, ekz. korektante eventualajn erarojn. Se li / ŝi tion farus, tio bremsus la parolfluon de la lernanto. Mense la studento irus al gramatiko kaj perdis la fadenon... eble li / ŝi ŝatos ĉesi...devos honti... intencos forlasi la salonon... Estas malfacile por instruisto silenti, ne reagi, ne movi iun vizaĝoparton, ne frapeti surtable per nervozaj fingroj, aŭskultante eraron ĉe la improvizanta lernanto. Tamen li / ŝi devas.

En tiaj situacioj povas okazi du specoj da eraroj. La unua speco estas dumprodukta eraro ; la studento bonege konas la uzon de la finaĵo –n por la objekto ekzemple, tamen forgesas ĝin pro pripenso pri la sekvo de la skeĉo, pri la enhavo de la teatraĵo. Por tiaj eraroj ne endas ion diri. Korektado estas superflua. La lernanto fakte aŭdas la eraron samtempe, kiel la publiko, sed la vorto jam forlasis lian / ŝian buŝon... ne plu eblas repreni ĝin... Foje la persono rediras la frazon ĝuste, por montri, ke li / ŝi konas tiun frazkonstruon. Aliaj eraroj povas montri al la instruisto, ke tiu lernanto ne ankoraŭ komprenis tiun aŭ jenan punkton de la gramatiko. En tiu momento la instruisto notu la eraron rapide kaj diskrete. Povas okazi, ke la gvidanto povos sugesti pli trafan vorton. Li notu tion. En posta fazo, ekster la paroliga rondo, post ĝi, tiu gvidanto dediĉu tempon al la bezonataj klarigoj por tiu studento, eble en plena kunsido, eble en dupersona momento. El tio oni komprenas, ke dum paroligaj rondoj la gvidanto havu paperon antaŭ si por noti.

Tiaj paroligaj rondoj ofte estas malagrablaj por la studentoj. Jes ja, ilia kapo plenas je ideoj, kaj iliaj lingvaj kapabloj ebligas al ili esprimi nur parton, parteton de tiuj abundaj, detalaj, trafaj ideoj. El tiu diferenco naskiĝas frustrado. Do ĉu tiaj trejnaj kunvenoj vere indas ? Kompreneble jes. Okazos jeno : la studento sentos siajn mankohavajn lingvokonojn kaj havos fortan deziron progresi. Do tiu frustrado efikos kiel puŝo, motivigo.

Mireille Grosjean

Fremdlingvoinstruisto dum 38 jaroj